




Kajeroj el la Sudo

ISSN 1886-1997



Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

<http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k91.html>

ISSN 1886-1938 (printita) ISSN 1886-1997

La Faraono 40^a



Vivu la Respubliko!

Ni ĉiuj estas Charlie Hebdo!

N^o 91^a

Januaro/februaro 2015

Redaktore

De la lasta jaro mi intencis plioftigi la aperon de nia revuo. Bedaŭrinde, mi ne povis aperigi ĝin kvarfoje la lastajn du jarojn, kvankam je 2015 mi intencas fari tion. Mi esperas, ke gelegantoj kuraĝigu min fari tion, sed eĉ se mi tion ricevas, mi klopodos fari kvar aŭ kvin numerojn dum la pasanta jaro.

Mi komencas redakti ĉi tiun artikolon je la lastaj minutoj de la jaro 2014, la lasta el la du jaroj, kiam mi pigris pri Esperanto kaj aparte pri **Kajeroj el la Sudo**, kaj nun estas momento por proponi al si pli bonajn projektojn por la Nova Jaro. Nun, ĵus antaŭ la ceremonio de la dekdu vinberoj, mi bondeziras al mi retrovi la tempon redakti almenaŭ niajn kvar kutimajn numerojn, kaj tiel la venontan decembrom ni ham havos la numeron 95^{an}, la unuan de la jaro 2016.

Ĉi tiun jaron mi vidis hororajn eventojn, kiel la forrabo de du cent lernantinoj en Abuja, ĉefurbo de Niĝerio nome de fia dio, kaj amasmortigo de geinfanoj en Peŝŭar', urbo de Pakistano, ankaŭ nome de dio, kiu ekzistas nur en mensoj malsanaj de fiuloj, ĉar dio, se ekzistas, amas geinfanojn, kaj ne pardonos, certe, fiagojn kontraŭ ili. Ne, la jaro ne estis bona por homaro, nek por homeco, eĉ por homo. Ni esperu, ke 2015 estos pli favora al ni ĉiuj, kaj ke ni ne devos senti honton, ke sencerbemuloj malicigos siajn ideologiojn aŭ similajn frenezaĵojn por murdado de inocentoj, estu ili infanoj aŭ ne.

Ankaŭ dum tiu fininta jaro mortis elstara plej mirata Gabriel García Márquez, Gabo.

Tuj post kiam li mortis, ĉiuj laŭdis lin, inkluzivante tiuj, kiuj fifamigis lin je la lastaj jaroj de lia vivo. Tio pensigis min pri tiom multe da homoj bonaj pri sia arto kaj vivo, kiujn oni devas laŭdi nun, kaj ne post iliaj mortoj, ĉar nur antaŭ tiam ili povos scii. Ŝajnas, ke tiuj laŭdoj utilas nur al konscienco de siaj dirantoj. Interkrampe mi diru, ke mi esperas, ke nia magazino ricevos laŭdon vian nun, ĉar ĝi ankoraŭ ne mortas. Ankaŭ mortis Pete Seeger (Pit Siiga), fama kantisto fondinto de movado hipi kaj ties kantoj, kiel *We shall overcome!* (Ni venkos!) kaj *Where have the flowers gone?* (Kien iris la floroj?), kiuj onidire haltis la militon de Vjetnamio. Ankaŭ mortis Claudio Abbado (Klaŭdio Abado), orĥestrestro itala, kiu naskiĝis en Milano kaj mortis okdek unu jaroj poste.

La dua de junio la Reĝo de Hispanio rezignis pri sia ofico. Bedaŭrinde nova reĝo ekprenis ĝin. Multaj respublikanoj deziris, ke li ne tion faru se oni ne demandu al popolo unue. Sed tio nur pruvis, ke en Hispanio demokratio estas ankoraŭ fremda. Ŝajnas, ke koruptado daŭrigos en la lando, ĉar la regantaj partioj faros nenion pri ĝi, kredigante la popolon, ke temas pri malhonestaj homoj, kiuj misuzas siajn postenojn, anstataŭ rekoni tion, kio estas evidenta: la sistemo estas perversa denaske ĉar ĝi volas ŝajnigi demokration, sed ade estas diktatoreco de partioj. Pro tio, mi ade rekomendas, dum tiu ĉi politika sistemo regos en Hispanio: **NE VOĈDONU, ĈAR TIEL VI ALMENAŭ HAVOS VIAN DIGNECON.**



Mi deziras, tamen, Feliĉan Novjaron al vi ĉiuj.

La fraŭdo pri pensiplanoj

Mi memoras, ke dum la jaroj 80^{aj} de la lasta jarcento, kiam ili ankoraŭ ne daŭris multe en povo, socialistoj komencis diri, ke «konvenas, ke civitano faru pensiplanon privatan ĉar socialasekursistemo en la estonto ne havos monon pagi pensiojn por tiuj, kiuj nun laboras.

Mi estis inter tiuj, kiuj kredis tion, ĉar kiu povus dubi pri la parolo de Moŝta Sinjoro Ministro? Kiu povus diri tiutempe, ke Ministro mensogas? Ĉefe tiu de registaro elektita de ĉiuj hispanoj. Kaj mi memfide vizitis la Bankon Eksteran de Hispanio kaj tie oni klarigis al mi, ke pere de malgranda monata alporto, kiam mi emeritiĝos mi ricevos monate ses cent eŭrojn, kiuj tiam ŝajnis multe da mono por oldulo emerita, kaj eĉ se ŝtato ne havos monon mi povos vivi la ceteran parton de mia vivo per tiu mono. Amiko, tamen, diris al mi saĝajn vortojn: *Se la ŝtato ne havas monon, bankoj ankaŭ ne havos. Tiel ne estos pension, ĉu publika, ĉu privata. Vi plej bone metu vian monon en skatolon por kiam vi estos maljuna.* Mi devintus sekvi lian konsilon...

Nun mi jam estas emerita, kaj mi trovas, ke la Banko Ekstera de Hispanio estis aĉetita de Argentaria, io nepensebla ĝis kiam ĝi okazis. Kaj poste Argentarian aĉetis BBVA, kiu estas banko, kiu ne volas scii ion ajn pri tiu pakto. Kion ĝi nun ofertas al mi estas doni al mi la 600 eŭrojn monate, sed nur dum la ŝparita mono de mi, plus ties intereso, daŭras. Sed mi

neniam subskribus tiun pakton, se oni dirintus al mi.

Nu, mi nun vidas, ke Ŝtato ne bankrotis, almenaŭ ne ankoraŭ, kaj ĝi pagas mian pension, ĉar ŝajnas, ke Sociala Asekursistemo estas pli daŭrebla ol vorto de bankoj.

Kiam mi parolas kun homo pri Asekursistemo, jam tedeas min aŭdi la saman mensogan klarigon: se estas malpli kaj malpli da kontribuantoj (laboristoj) oni ne povas garantii la pagon de pensioj en la estonto, ĉar estas pli kaj pli da pensiuloj. Alidrate: iom post iom estas malpli da homoj, kiuj pagas, kaj pli da homoj, kiuj ricevas monon. Sed tiu mensogo venas el aliaj du:

1 Oni diras, ke la monon, kiu ĉiu kontribuanto pagos estas por pagi pensiojn de nunaj emerituloj, ne por sia propra pensio.

2 Oni ne povas pagi pensiojn per alia mono al tiu, kiun pagas laboristoj al Asekursistemo.

La unua mensogo estas konfeso malferma, ke estas ŝtelspezo akceptita de ĉiuj. Nu, preskaŭ ĉiuj, ĉar mi ne akceptas tion. Ĝi estas maletika kaj neakceptebla, ke oni pagas aferon kaj oni destinas tiun pagon al alia. Se entreprenisto ricevas monon por afero kaj pagas alian aferon per tiu mono, li aŭ ŝi iras karceren pro ŝtelspezo. Kial Ŝtato aŭ ties funkciuloj povas fari tion, se ĝi estas krimo?

Ho, jes, mi memoras kial..., pro tio, kion oni nomas **imunecon**: kiam plej granda

kvanto da deputitoj oernesis juĝiston prosekuti pro ŝtelspezo la gvidanton de la majoritata partio, aŭ ties ministro? Nu, estis kazo, kvankam ne pro ŝtelspezo: kiam oni malkovris GAL, la terorisman asocion elregistara. Oni diras, ke pro tio, ke la afero ne tuŝos la Prezidenton de l' registaro, kiam li ne plu estos prezidento, ĉar terorismaj krimoj neniam priskribas, ministro Barrionuevo prenis la tutan respondecon sur sin, ĉar estos multe pli skandala, ke eksprezidento enkarceriĝu... Tiu ne estas mia teorio, sed oni ĝin povas trovi je tiutempaj ĵurnaloj.

Pro tio, aŭ eĉ male al tio, mi demandas min, kiam oni prosekutos la kvin eksprezidenton de la registaro y kaj siajn ministrojn kaj eksministrojn pri Financo, pro afero tiom ŝafe akceptita de preskaŭ ĉiu hispano, tiu ŝtelspezo pri mono publika se ĝin jam akceptis homoj kaj estas kutimo pri fari tion? «Evidente ne, ulo, ne ĝenu», oni diros al mi.

Tamen, evidentiĝas, ke tio, kion pagis ni ĉiuj, kiuj kvotis al Asekursistemo inter 1976 kaj 2010 estis NIA pensio, ne tiu de tiamaj pensiuloj, kiuj siavice devus ricevi tion, kion ili generis per siaj kvotoj dum sia tuta laborvivo. Tion ni pagis, kaj tion ni postulas, ĉar tio estas justa.

La dua mensogo ĉesis esti vere kiam diversaj prezidentoj de l' registaro komencis uzi monon de la Asekursistemo por pagi aliajn aferojn, kiuj neniel rilatis al sia dekomenca destino, kiel ekzemple la 400 eŭroj Zapatero promesis disdoni, se li venkis la balotadon, aŭ por la «beba ĉeko», kiun malmulte da paroj ricevis. vidu: se oni povas preni monon de tiu skatolo por alia afero, ankaŭ oni povas fari inverse: preni monon de alia skatolo por pagi pensiojn. Ekzemple, tiu el

monpunoj.

Sed ankoraŭfoje lamas la mensogo plej granda el ĉiuj, tiu malvero senhonta, kiun diras politikistoj de ĉiu plumo: NUN la laboristaro produktas multe pli da riĉeco ol je 1949, kiam la Generalo Franko kreis la Asekursistemo (kontraŭ la opinio de la lasta Prezidento de la Dua Respubliko, Manuel Azaña, esprimita jardeko antaŭe: «la proverba hispana pikanto okazigos la sistemon frakasi»). Pro tio nun estas pli da mono ol neniam antaŭe. Kaj ĉiun jaron estos pli se prospero de la lando kreskas, kiel estas devo de ĉiu deca registaro, kies salajron oni pagas ekzakte por tio, inter aliaj aferoj, kiel ekzemple por ke estu pli da justeco kaj zorgu al tio, ke aferojn oni faros bone kaj favore al ĉiuj kaj ne sole de sia politika partio.

Sed estas kontraŭ tio la perverseco de la sistemo, ĉar koruptado ne temas pri homoj, sed de la sistemo mem. Tiu ĉi estas korupta sistemo ĉar ĝi naskiĝis tiel kaj ĝis kiam ĝi ne mortos kaj estos anstataŭigita de alia daŭre suferigos senkiale socion kiun ĝi parasitas. Kaj ĝi ne falos ĝis kiam ni ĉiuj komprenos, ke tiu ĉi lando estas ĉies kaj ni venigos sistemon en kiu laboros ni ĉiuj, kaj kiun ni ĉiuj defendos ĉiun tagon tiel ke ni ne perdos ĝin: La Tria Respubliko Hispana. Hodiaŭ diris al mi dommastrino: «Jes, sed sen milito»; kaj mi devis memori al ŝi, ke la milito ne estis por venigi la respublikon, sed por forpreni ĝin. Respubliko venis sen eĉ unu pafo. Kaj la Tria venos sen perforto surstrata, sen eĉ perfortulo, kiu agos ekster leĝo, sed nur kiam ĉiu hispano diru tiujn du vortojn kie ajn li aŭ ŝi estos, kioma ajn: **Vivu Respubliko!**

Inŝ' Ala'!

Mi partoprenas grupon de Facebook (fejsbuk'), pri literaturo en la angla, al kiu membras pli ol 100 000 homoj el diversaj partoj el la mondo, sed ĉefe el Bharato kaj Pakistano.

Okaze de la murdado de Parizo fare de du krimuloj (iliajn nomojn ni forgesu!) pro, siadire, *venĝi ofendojn al profeto*, neniu diris ion ajn en tiu grupo. Mi faris

simplan demandon tie: *Ĉu rajtas religio limigi literaturon?*

Kelkaj respondis jese, aliaj nee, sed multaj akre reagis insultante, pro tio, ke *oni ne povas insulti Dion kaj sian Profeton*, ĉar *oni ne povas insulti eĉ pridubi la solan veran religion kaj dion*.

Terure estas, ke inter tiuj sensencaj voĉoj pli laŭtiĝas tiu de profesoro de universitato pakistana, kiu akuzis min pri *deflankigi junajn virinojn el korekta vojo* al Dio. Mi demandis al li, ĉu li konas, ke tiu vojo estas, kaj kiu, tiu dio estas, sed li akre koleriĝis kaj protestis al posedanto de la grupo.

La afero estas plorinda per si mem:

homaro ŝajnas neniam atingi liberecon kaj respektemon, ĉar homoj amas siajn katenojn, ĉefe tiujn malfacili elliberiĝi sin pro tio, ke ili estas mensaj kaj tiel nevideblaj.

Homoj emas pensi, ke tio, kion oni ne povas vidi, ne ekzistas. Sed vere tio, kio

ne ekzistas ja povas vundi nin multe pli longe kaj profunde. Ignoranteco n oni ne vidas, ankaŭ, ĉefe pro tio, ĝi ne vere ekzistas, sed manko da saĝeco, lerteco kaj

kono. Kaj mi ne povas ne pensi, ke ja devas ekzisti iu ajn, kiu zorgas pri ni, pro tio, ke la mondo jam ne malaperis kaj ne malaperas pro tio, ke en lando, kiu havas atombombon, regas homoj, kiuj firme kredas, ke ili honoras Dion, kiu estas la sola kaj vera dio, kaj kiu sanktigas murdadon, kaj se oni kuraĝas kritiki tiun sanktan ekzekuton, oni komplicas krimon kontraŭ digneco dia.

Pro tio tiuj homoj malebligas la atingon de libereco pri penso kaj esprimo, laŭ ili gravaj malamiko de fido sia.

Longa kaj dura, sekve, estas batalo por libereco. Ĉar dum estas homo, kiu ne estas libera en la mondo, libereco ne ekzistas.



Vivu la Respubliko! *La vera korinklino.*

Sajnis, ke homoj finfine vekiĝis. Finfine ili komencis ami Respublikon. La aferon publikan, ĉies aferon. Ĉie ajn oni parolis pri soldatoj.

La instruisto de la urbeto ankaŭ parolis pri soldatoj. Neniu povus rilati lin al ili, eĉ se soldatoj estas filoj de la popolo. Tial soldatoj

ne pafis la popolon. Ili preferis pafi la plafonon de la Parlamento.

Kaj venis la momento por balotado. Siaj geamikoj deziris, ke li estu en la malferma listo por Konstituiga Parlamento, sed li komprenis nenion pri leĝoj. «Tamen vi scias pri tio, kion ni ĉiuj volas», oni diris al li. «Kaj vi

scias pri tio, kion oni devas fari». Sed li diris ne, ke tio, kion oni devas fari estas instrui geinfanojn en lernejo. Legi. Skribi. Pensi. Kaj pesi tion, kion aliaj diras. El tio venis tiu diraĵo, *Scii pli ol LEPE: Legi, Elmanskribi, Pensi, Ekstudi.*



Kaj la Parlamento havis, unuafoje, homojn, kiuj pensas. Finfine ili faris longan leĝon, kun multaj artikoloj, kiuj iris, ke

ĉiuj civitanoj samas rigarde al la leĝo. Kaj ke estas kontraŭjure, ke oni malebligu, ke oni esprimu sian person nur pro tio, ke aliaj homoj ne ŝatas ilin. Kaj ili faris novan reglamenton parlamentan. Poste ili faris Konstitucion kun dudek artikoloj. Kaj ili proponis al popolo, ke ĝi aprobu ĝin.

Kaj la popolo aprobis ĝin.

Francisco! Kial vi ne silentas?

La papo ŝanĝigas sian nomon ekhavante sian oficon, oni diras, ĉar enirante sian novan kondiĉon li rompas kun tuta sia antaŭa vivo, kaj

papo, li ankoraŭ ricevis nombron, same kiel Francisco ne havas), ĉar li malestimis ĝentilojn favore al judoj, kio estis la politika korekteco tiam. Tamen, papo Petro mallevigis siajn okulojn kaj, humila, korektis sian konduton.



Mi ne estas Sankta Păŭlo, sed mi povas memori la Papon, kaj lin memorigas mi, ke li ne plu estas G. M. Bergoglio, kaj sekve se oni malestime parolas pri la patrino de Jorge, tio devas gravi al Francisko same kiel se oni malestime

li ne plu estas persono privata, sed la Reprezentanto de Kristo sur la Tero, la servanto de la servantoj de Dio. Pro tio Karol Wojtiŭa, ekzemple, la batalema arĥepiskopo de Krakovio, ne plu rilatis al bonkora Johano Păŭlo 2^a, kiun li iĝis tuj papiĝante. Sed ŝajnas, ke Jorge Mario Bergoglio ankoraŭ vestumas la haŭton de Papo Francisco tiel, kiel S-ro Hyde surtavoliĝis al boneco de dolĉa Doktoro Jekyll.

Mi memoras, ke foje Sankta Păŭlo skoldis la tiaman papon (kiu estante la unua

parolas pri la patrino de Mariano Raŭoj, aŭ tiu de Kristina Fernandes de Kirĉner, aŭ al tiu de Kuro Ĥimenez, ĉar papo Francisco jam ne plu havas alian patrinon ol Katolika Eklezio, aŭ eble La Plej Sankta Virgulino Maria, kiel postulas lia nova metio, ĉar li nun dediĉas sin administri Regnon, kiu ne estas de ĉi tiu Mondo, kaj sekve li ne plu povas agi kiel kvartala bravulaĉo, kies patrinon oni ne povas menciigi ĉar li koleros kaj pugnobatos onin. Eĉ modesta vilaĝpastro ne povus diri tion, ĉar Jesuo mem proponis meti sian alian vangon kiam oni ofendas vin, doni mantelon ankaŭ kiam oni petas sakon de vi, ke oni amu sian malamikon, kio estis la plej revolucia mesaĝo dum tuta


antikveco, ĉar tiu estis epoko, kiam oni detruas malamikon. Kion proponas la Papon, flati la popolon denove? Ĉu li jam laciĝis esti popola, kaj nun li volas esti popolisma? Tiom da jaroj en seminario kaj eklezia kariero por fini redonante malbonon por malbono? Ĉu li vere forgesis la alian lecionon, kiun kun larmoj en okuloj Papo Petro lernis en Getsemanio pri tio, ke tiu, kiu per fero mortigas, per fero mortos? Ĉu Lia Sankteco publikigos denove **La indokson de libroj malpermesitaj**? Yes? Ĉu li cenzuros, por komenci, la humoristoj de la franca magazino **Charlie Hebdo**? Vi trompas min, S-ro Georgo. Mi kredis, ke vi estas same kiel mi, Charlie. Ni vidu: rigardu vi al miaj okuloj kaj ripetu: «Mi estas Charlie», «Jes suis Charlie», «Io sono Charlie». Ĉu ne? Mi sentas trompita, Via Santeco. Mi kredis, ke vi ne frapas, sed benas, laŭ la lecionoj de via majstro, kiu estis krucumita, torturita, murdita, kio estas multe pli grava kaj malfacile pardoni ol menciigi vian patrinon, eĉ se oni estas la plej grava aŭtoritato de lando kun malmulte da fizika spaco, sed la plej granda popolo en la mondo anstataŭ la episkopo de Romo..., la servanto de la servantoj de Dio.

Vi ĵus perdis, S-ro Georgo, la ŝancon lokiĝi super la malbonoj de ĉi tiu mondo kaj doni al ni la perspektivon de la Regno de l' Ĉielo, kiel pro via metio korespondas

al vi; paroli al ni je redoni bonon kontraŭ malbono; pri ami la malamikon kaj helpi lin. Parolante vi pri "il pugno" vi misrespektis ĉiujn martirojn de Kristaneco, tiujn, kiuj ne prenis glavon por sindefendi kontraŭ leonoj en la romia cirko, ĉar vi defendis la doktrinon respondi malbonon per malbono, venĝemo, agreso, en la media cirko de televido. Vin mi kompatas, ĉar vi ne povis instrui fanatikulojn muslimajn, aŭ muslimojn, kiuj ne estas fanatikaj, ke estas io preter pardono kaj homaj pasioj. Ke oni pardonas pekantojn, sed ne pekon. Ke pekon oni kondamnas al forgeso ne farante ĝin ni.

Ne, Sinjoro Georgo, vi ne konvinkas min. Vi ne garantias, ke via regno ne estas de ĉi tiu mondo. Se mi estus katolika, mi ne plu iros al meso ĝis kiam vi pardonpetu la martirojn de la Katolika Eklezio, kiel papo Johano Paŭlo 2-a faris kun viktimoj de la turpezo de la Katolika Eklezio laŭ jarcentoj, kiel Galileo Galilei kaj Hipatia de Aleksandrio, kiun tiutempaj kristanoj ne batis per siaj pugnoj, sed per ŝtonoj.

Kelkaj homoj dirus, ke mi troigas, sed mi sentas, ke mi estas fraŭdita. La Papo nun ne plu estas la Reprezentanto de Dio sur la Tero, sed la prelato plej grava de l' mondo. Kaj estas diferenco: tiu inter dia kaj homa.



Pri la flago de la Respubliko

En ĵusa pasinto amiko komentis pri miaj ŝelkoj, ke ili ne estas konstituciaj, pro tio, ke ili havas la kolorojn de la flago de la Dua Respubliko Hispana.

«Ĉu viaj estas konstituciaj?», mi iomsarkasme kaj trecinike respondas al li.

Mia amiko agnoskas, ke ne, ke siaj brunaj ŝilkoj nenion havas konstituciaj aŭ kontraŭ konstituciaj.

«Sed», li aldonas, «tiuj viaj referencas al flago, kiu ne estas konstitucia».

«Ĝi ne plu estas», mi konsentas, «sed tio estas klara sopiro al sistemo, kiu devus regi Hispanion».

«Tamen tio estis tragedio!»

«Jes, mi neas nenion. Sed tiu koloro, kiun vi nun vidas malsama al tiu de flago, kiu nun konstitucas, reprezentas nenion pli ol unueco de Hispanio, kaj tie estas vundo, kiu doloras al ĉiuj politika korektuloj».

«Kio?», akre respondas mia amiko, «vi estas ignoranto. Ĉu vi ne scias, ke tiu estas la koloro de la Standardo de Kastilio?»

«Certe, mia kara amiko. Kaj kiu prenis la regadon de l' Standardo de Kastilio al tiama Regno de Granado?»

«La Katolikaj Gereĝoj, Isabel' kaj Fernando. Sed kial respublika flago devus honori ian ajn reĝon aŭ reĝinon, se ili, aldone, eĉ kromnomiĝis *La Katolikaj*?»

«Ne estas honoro al gereĝoj, sed al

unueco de Hispanio, stultulo», mi aldonas, ne plu regante ĝentilan sintenon. «La Lando de Kunikloj, kiun fenicianoj konis kiel Hispanion estis aro da triboj, kiuj nenion komunan havis inter unu la aliaj



ĝis kiam romianoj aperis, kaj ili invadinte ĝin el nordo suden unuigis ĝin donante ilin komunan lingvon, la latinan, kaj aro da kulturaj eroj ankaŭ komunaj, kiel ĵuro, lernado kaj emo al arto kaj civilaj faraĵoj, kiel la unuaj pontoj kaj ŝoseoj en la lando, multaj el kiuj ankoraŭ oni uzas en nia lando.

Kaj ni daŭre diskutis tiel dum kelke da tempo, ĝis kiam estis klare al mia amiko Pankracio, ke estas nenio perversa en respubliko, ĉar ĝi ne signifas la katastrofon, kiu estis la Dua Respubliko, aŭ la primokon, kiu estis la Unua, sed ankoraŭ eblas konstrui respublikon, en kiu nin ĉiujn oni reprezentos, ĉiujn hispanojn, eĉ se ne perversajn instituciojn kiuj kreskis funde de ĉi tiu konstitucio, kiun ni suferas, tiu de 1978: aŭtonomioj. Tiuj dek sep preterregionoj disvolviĝis el

simplaj iloj por proksimigi civitanojn al registaro, kio estus utila en epoko pasinta, kiam estis malfacile kaj koste iri al ĉefurbo solvi gravajn aferojn, en malgrandajn ŝtatojn, kiuj voras la monon, kiun la supozeblajn reprezentatojn bezonas, pri aferoj, kiuj neniel rilatas al komuna bonfarto, en epoko de interreto kaj tuja komunikado al ĉiuj punktoj de l' planedo. Tial ili devas malaperi, kaj nenio malpli traŭma por ĉiu, se la procedo estas, ke ili malaperu proklamante novan konstitucion per kiu la plej granda zorgo de civitanoj estas vidi anstataŭi je la kapo de la lando reĝon, kiu jam estis dum mil jaroj (kun nur du periodoj tre mallongaj senreĝe) per Prezidando elektita de ni ĉiuj.

Kelkaj ignorantoj kredas, ke iu el aktualaj politikistoj validos por la posteno, sed mi jam klarigas per mia libro **Vivu Respubliko!**, kial tio ne eblas: ili ne havas servan spiriton, ili ne konceptas sian politikan postenon kiel laboron fari, sed kiel avantaĝon, kaj tion pruvas la fakto, ke ili pli deziras esti mortintaj aŭ enkarceritigaj ol demisiitaj. Bona politikisto devas preti renonci sian postenon antaŭ fari agon, kiu naŭzigos sian konsciencon. Dum ni ne havos politikistojn kun tiu sinteno, politiko ne eblos en tiu ĉi lando. Ĉar politiko esta la arto ebligi tion, kio necesas, kaj ne necesas, ke malaperu publikan monon favore al amikoj de politikistoj aŭ al politikistoj mem, sed tute male: fari ĉion necesan, kaj se ne estas mono por tio, ke oni aperigu ĝin. Oni ne povas dreni mone la landon sinsekve, ĉar kiam elĉerpiĝos la kondiĉoj, por ke la popolo havos agrablan vivon, aŭ almenaŭ eblan, aperas la risko pri revolucio, kiu forpuŝos ankaŭ bonajn

aferojn, same kiel ĉiujn malbonajn, sed poste, se tiuj plej turpaj homoj sukcesas eniri en povon, kiel okazis dum la sovetaj jaroj de Rusio kaj dum la Dua Hispana Respubliko, venos tempoj de mizero morala kaj homa, dum kiu revenĝismo prenas povon ĉiam ĝis kiam, finfine, iu kun iom da inteligenteco kaj regopovo ordigos la aferon.

Sed tiu ĉi respubliko devas veni, kaj iam venos. Mi nur esperas, ke ĝi estos produkto de la deziro de l' popolo, kaj ke la popolo montros sian volon pere de referendumo organizita de honestaj politikistoj, kiuj finfine atingos la povon. Ne tiuj, kiuj diris ion kaj nun faras alian, kaj kiuj neniam plenumos sian parolon, kun ili diris dum sia elekta kampanjo. Mi jam tedeas pri diraĵoj kiel «programojn oni verkas por ne plenumi ilin». Tio estas, kvazaŭ vi mendas bieron en trinkejo kaj oni donas al vi kafon, ĉar «tion, kion oni petas, oni ne donas». Sekve, vi foriru el la trinkejo senpagante; ili iru enferen. Sed laŭŝajne registaro de lando, de nia lando, valoras malpli ol biero. Ĉar ni ne lasas la trinkejon nepaginte. Ĉi tie ni ĉiuj pagas. Kaj ni pagas tion, kion ni ne mendis. Sed ni ne povas ne pagi tributon, kiun tiuj homoj postulas je la militkrio (tio estas, ilia slogano, falsa kiel ĉio, kion ili diras), ke *Se ne, diktaturo venos!* Ĉu alia?, mi respondas..., ĉar ĉu ĉi tio, kion ni nun suferas (kaj monsubtenas) ne estas diktatoreco? Diktatoreco de politikistoj kiuj diras, ke ili faros aferojn, kaj kiam oni jam elektis ilin por fari tion, ili faras male. Kaj vi ne protestu, subulo, ĉar mi metos vin en karceron kaj monpunos vin per miloj da eŭroj... Por fari male ni jam havis socialisman premieron Rubalkabon. Kaj tial, ke estis

same, ke venkis Marjano aŭ Alfredo, klaŭniĝis tiuj, kiuj voĉdonis en la lasta baloto, ĉar estis ekzakte same voĉdoni kaj ne voĉdoni. Iam ni scios pri tio, kiu vere regas Hispanion. Tiujn ni devas forpuŝi el povo. Kaj tion oni faros per nova konstitucio, kie ne estos loko por ili. Kie ne estos loko por institucio, sed nur por personoj.

Pro tio ni devas zorgi kaj promocii la flagon de nia respubliko: la sangon, kiun oni verŝis konstrui Hispanion, kiun oni ne povas malestimi, same kiel la honton, kiun ni devis suferi dum mil jaroj da monarĥio, ambaŭ ruĝkoloraj. La oro, kiun romianoj forprenis el Hispanio (jes, eĉ se oni nun parolas pri la oro amerika, veras, ke romianoj faris same ĉi tie, en nia lando, du mil jaroj antaŭe), ekzakte en minejoj *La Medoloj*, provinco de Leon', kie ili detruis kelkajn montojn kies restaĵojn oni povas vidi tie, kaj kiuj utilis printi, dum du cent jaroj, la plej varloran moneron dum

la tuta historio de Romio, Aŭreon, kiun oni povas rigardi kiel simbolon de la graveco, kiun Hispanio havis en la pasinto jam de tiu epoko, kaj sekve konservi oron en nia flago ni diras, ke ni ne renoncas al tiu graveco. Kaj finfine violkoloro reprezentas unuecon de Hispanio, kiu dum ĝi restos unuiĝinta gravos en historio de Eŭropo kaj la mondo, malgraŭ la malsuperaj kompleksoj de estroj de la tajforegnoj kiujn nun oni referencas kiel aŭtonomiojn. Ĉu ili lernis nenion el historio? Ĉu ili ankoraŭ ne komprenis la diferencon inter la Kalifejo de Kordovo kaj la Tajforegnoj, kiujn kristanoj povis konkeri pro ilia malunuiĝo?

Pro tio ĉio mi faras tion, kion mi povas, anoncante miajn motivojn per ŝelkoj miaj, kiujn mi montras kie ajn mi iras. Ili estas silenta krio de privata slogano, kiun mi deziras, ke iam estos tiu de ĉiu hispano: **Vivu Respubliko!**



La faraono

Ĉapitro 40^a

Eksciinte de Hiram, ke Fenicianoj donacis al li la pastrinon, la kronprinco volis plej baldaŭ havi ŝin en sia domo, ne ĉar li ne povis vivi sen ŝi, sed ĉar ŝi estis por li novaĵo.

Sed Kama prokrastis la alvenon, petegante la princon, ke li lasu ŝin trankvila, ĝis kiam malgrandiĝos la alfluo de pilgrimoj, kaj precipe ĝis la forveturo de plej eminentaj gastoj. Se dum ilia ĉeesto ŝi fariĝus amatino de l' kronprinco, povus malgrandiĝi la enspezoj de la templo, kaj la pastrinon minacus danĝero.

— Niaj saĝaj kaj grandaj — diris ŝi al Ramzes — pardonos al mi la perfidon. Sed la popolaĉo alvokos sur mian kapon la venĝon de l' dioj, kaj vi, sinjoro, scias, ke la dioj havas longajn manojn...

— Ili ne perdu ilin, kiam ili enŝovos ilin sub mian tegmenton! — respondis la princo.

Sed li ne insistis, ĉar lia atento estis tre okupita en tiu tempo.

La asiriaj ambasadoroj, Sargon kaj Istubar, jam forveturis Memfison, por subskribi la traktaton. Samtempe la faraono alvokis Ramzeson, por ke li prezentu raporton pri sia vojaĝo.

La princo ordonis al la skribistoj detale priskribi ĉion, kio okazis de l' momento, kiam li forlasis Memfison: la revuon de la metiistoj, la vizitadon de la fabrikoj kaj kampoj, la interparoladojn kun la nomarĥoj kaj oficistoj. Tutmozis estis elektita de li, por prezenti la raporton.

— Antaŭ la persono de la monarĥo —

diris al li la princo — vi estos mia koro kaj mia buŝo. Jen kion vi devas fari:

Kiam la plej nobla Herhor demandos: kion mi pensas pri la kaŭzoj de la mizero de Egipto kaj de l' trezorejo, respondu al la ministro, ke li sin turnu al sia helpanto Pentuer, kaj tiu klarigos miajn opiniojn same, kiel li faris tion en la templo de la dia Hator. Se Herhor volos scii, kia estas



mia opinio pri la traktato kun Asirio, respondu, ke mia devo estas plenumi la ordonojn de nia sinjoro.

Tutmozis balancis la kapon, por montri, ke li komprenas.

— Sed — daŭrigis la kronprinco — kiam vi staros antaŭ mia patro (li vivu eterne!) kaj konvinkiĝos, ke neniuj vin aŭskultas, falu al liaj piedoj en mia nomo kaj diru:

"Sinjoro, jen kion diras al vi filo kaj servisto via, mizera Ramzes, al kiu vi donis la vivon kaj povon. La kaŭzo de la malfeliĉoj de Egipto estas la malgrandiĝo de la fruktodona teritorio, kiun invadis la dezerto, kaj la malgrandiĝo de la loĝantaro, kiu pereas de la laboro kaj mizero. Sed sciu, nia sinjoro, ke ne malpli grandan malutilon, ol la morto kaj dezerto, kaŭzas al via trezorejo la pastroj. Ĉar ne sole iliaj temploj estas plenaj de oro kaj juveloj, per kiuj oni povus pagi ĉiujn ŝuldojn, sed la sanktaj patroj kaj profetoj havas ankaŭ la plej bonajn bienojn, la plej bravajn laboristojn kaj kamparanojn, kaj pli multe da tero ol la dio-faraono.

Jen kion diras al vi filo kaj servisto via, Ramzes, kiu dum la tuta vojaĝo havis ĉiam malfermitajn okulojn kiel fiŝo, kaj levitajn orelojn kiel prudenta azeno."

— Kaj se — daŭrigis la vic-reĝo — lia sankteco demandas, kia estas mia opinio pri Asirianoj, falu sur la vizaĝon kaj respondu:

"La servisto Ramzes, se vi permesas, kuraĝas opinii, ke Asirianoj estas grandaj kaj fortaj bravuloj, kaj havas bonegajn armilojn, sed tuj vidas, ke ili estas malbone ekzercitaj.

Sargonon ja sekvis la plej bonaj asiriaj batalistoj: arkistoj, hakilistoj, lancistoj, sed mi ne vidis eĉ ses soldatojn, sciantajn marŝi akorde en rekta vico. La lancojn ili ne portas rekte, iliaj glavoj estas malbone alligitaj, la hakilojn ili portas kvazaŭ ĉarpentistoj aŭ buĉistoj. Iliaj vestoj estas pezaj, iliaj dikaj sandaloj brogas la piedojn, kaj iliaj ŝildoj, kvankam fortikaj, ne multe utilos, ĉar la soldato estas mallerta."

— Vi diras la veron — interrompis Tutmozis. — Mi rimarkis la samon kaj la samon mi aŭdas de niaj oficiroj, kiuj diras,

ke tia asiria armeo, kian ili vidis tie ĉi, kontraŭstaros malpli forte ol la libiaj bandoj.

— Diru ankaŭ — daŭrigis Ramzes — al nia sinjoro, kiu donacas al ni la vivon, ke la tuta egipta nobelularo kaj armeo bolas ĉe la sola penso, ke Asirio povus forpreni Fenicion. Fenicio estas ja la haveno de Egipto, Fenicianoj estas plej bonaj maristoj de nia ŝiparo. Diru fine, ke mi eksciis de Fenicianoj (tion lia sankteco devas scii pli bone), ke Asirio estas hodiaŭ malforta: ĝi havas militon en la nordo kaj oriento, kaj la tuta Azio estas kontraŭ ĝi. Se do ni hodiaŭ atakus ĝin, ni povus akiri multe da trezoroj kaj sklavoj, kiuj helpus niajn kamparanojn en la laboro. Finu per la vortoj, ke la saĝo de mia patro superas la homan saĝon, kaj ke mi agos, kiel li ordonos al mi, se nur li ne donos Fenicion en la manojn de Assar, ĉar tio estus nia perejo. Fenicio estas la bronza pordego de nia trezorejo, kaj kie estas homo, kiu donus sian pordon al ŝtelisto?"

Tutmozis forveturis Memfison en la monato Paofi (julio, aŭgusto).

Nilo komencis forte kreski. Malgrandiĝis la alfluo de la aziaj pilgrimoj en la templon de Astarte. La egipta loĝantaro okupis la kampojn, por plej rapide kolekti la vinberojn, linon kaj kreskaĵon, donantan specon de kotono.

Unuvorte, la ĉirkaŭaĵo trankviliĝis, la ĝardenoj, ĉirkaŭantaj la templon de Astarte, estis preskaŭ malplenaj.

En tiu tempo la princo Ramzes, libera de la amuzoj kaj ŝtataj devoj, sin ekokupis per sia amo al Kama. Foje li sekrete interkonsiliĝis kun Hiram, kiu en lia nomo oferis al la templo de Astarte dek du talentojn en oro, belege skulptitan malakitan statueton de la diino, kvindek bovinojn kaj cent kvindek mezurojn da

tritiko. Tio estis tiel malavara donaco, ke la ĉefpastro de la templo venis mem al la vic-reĝo, por fali antaŭ li sur la ventron kaj danki pro la favoro, kiun, kiel li diris, neniam, neniam forgesos la popoloj amantaj la diinon Astarte.

Fininte la aferon kun la templo, la princo alvokis al si la poliestron de Pi-Bast kaj pasigis kun li longan horon. Post kelke da tagoj la tuta urbo eksterordinara novaĵo.



Kama, la pastrino de Astarte, estis forrabita, ien forkondukita kaj malaperis, kiel sablero en la dezerto!...

Tio okazis en sekvantaj cirkonstancoj:

La ĉefpastro sendis Kaman en la urbon Sabne-Hetam apud la lago Menzaleh kun donacoj por la tiea kapelo de Astarte. La pastrino vojaĝis nokte en ŝipeto, por eviti la someran varmegan kaj por ŝirmi sin de la scivolo kaj respektemaj salutoj de la loĝantoj.

Ĉe la tagiĝo, kiam la kvar remistoj lacaj ekdormetis, el la apudbordaj arbetoj subite elnaĝis ŝipoj, kondukataj de Grekoj kaj Ĥetoj, ĉirkaŭis la ŝipeton de la pastrino kaj forkaptis Kaman. La atako estis tiel rapida, ke la feniciaj remistoj tute ne kontraŭstaris; al la pastrino oni verŝajne ŝtopis la buŝon, ĉar ŝi eĉ ne havis tempon ekkrii.

Plenuminte ĉi tiun malpian agon, la Ĥetoj kaj Grekoj malaperis en la arbetoj por atingi poste la maron. Por garantii sin kontraŭ la persekuto, ili renversis la ŝipeton de la templo de Astarte.

En Pi-Bast ekbolis kvazaŭ en poto: la tuta loĝantaro parolis nur pri tio. Oni eĉ nomis la kulpulojn. Unuj suspektis Sargonon, kiu proponis al Kama la titolon de edzino, se nur ŝi konsentos forlasi la templon kaj veturi kun li Ninivon. Aliaj suspektis Likonon, kiu estis kantisto de Astarte kaj de longe pasie flamis al Kama. Ankaŭ li estis sufiĉe riĉa por dungi grekajn rabistojn, kaj verŝajne sufiĉe malpia, por ne ŝanceliĝi forkapti pastrinon.

Kompreneble, en la templo de Astarte oni kunvokis por konsilo la plej riĉajn kaj la plej piajn fidelulojn. Oni antaŭ ĉio decidis liberigi Kaman de la pastraj devoj kaj depreni de ŝi la malbenon, kiu minacas ĉiujn virgulinon, kiuj en la servado al la diino perdis sian ĉastecon.

Tio estis ordono pia kaj saĝa: ĉar se iu superforte forrabis la pastrinon kaj kontraŭ ŝia volo senigis ŝin je la pastraj benoj, maljuste estus puni ŝin.

Post kelke da tagoj, ĉe la sonoj de trumpetoj, oni anoncis al la fideluloj, en la templo de Astarte, ke Kama mortis, kaj ke se iu renkontus virinon similan al ŝi, li

ne havas rajtan venĝi ŝin, eĉ fari al ŝi riproĉojn. Ĉar ne ŝi, ne la pastrino forlasis la diinon, sed forrabis ŝin malbonaj spiritoj, kiuj estos punitaj.

En la sama tago la nobla Hiram estis ĉe la princo kaj donacis al li en ora skatolo, pergamenon, kovritan per multe da pastraj sigeloj kaj per subskriboj de la plej eminentaj Fenicianoj.

Tio estis la verdikto de la pastra juĝo de Astarte, liberiganta Kaman de la ĵurpromesoj, se nur ŝi forlasos sian pastran nomon. Kun ĉi tiu dokumento, kiam la suno subiris, la princo iris en iun izolitan palaceton en sia ĝardeno. Li malfermis la pordon per sekreta maniero kaj suriris en malgrandan ĉambron de la unua etaĝo.

Ĉe la lumo de skulptita torĉo, en kiu brulis bonodora oleo, la princo ekvidis Kaman.

— Fine!... — ekkriis li, donante al ŝi la oran skatolon. — Vi havas ĉion, kion vi volis.

La Fenicianino estis ekscitita; ŝiaj okuloj brilis. Ŝi kaptis la skatolon kaj ĵetis ĝin sur la plankon.

— Vi kredas, ke ĝi estas ora?... — diris ŝi. — Mi donos mian ĉirkaŭkolon, ke la skatolo estas kupra kaj nur kovrita de ambaŭ flankoj per maldikaj oraj folioj!...

— Tiel vi salutas min?... — demandis la mirigita princo.

— Ĉar mi konas miajn fratojn — respondis ŝi. — Ili falsas ne nur oron, sed eĉ rubenojn kaj safirojn...

— Virino... — interrompis la princo — en ĉi tiu skatolo estas ja via sendanĝereco...

— Mi mokas la sendanĝerecon!... — respondis ŝi. — Mi enuas kaj timas... Mi sidas ĉi tie jam kvar tagojn kvazaŭ en malliberejo...

— Ĉu io mankas al vi?

— Mankas al mi la lumo... spiro... ridoj, kantoj, homoj... Ho venĝema diino, kiel severe vi punas min!...

La princo aŭskultis mirigita. En la furioza virino li ne rekonis Kaman, kiun li vidis en la templo, la virinon, kiun kantis la pasia voĉo de la Greko.

— Morgaŭ — diris la princo — vi povos eliri en la ĝardenon... Kaj kiam ni venos Memfison, Tebojn, vi amuziĝos kiel neniam antaŭe... Ekrigardu min. Ĉu mi ne amas vin kaj ĉu ne sufiĉas al virino la honoro, ke ŝi apartenas al mi?...

— Jes, — respondis ŝi kolerete — sed vi havis kvar antaŭ mi.

— Se vin mi amas pleje...

— Se min vi amus pleje, vi farus min la unua, vi loĝigus min en la palaco, kiun okupas tiu... Hebreino Sara kaj vi donus gardistojn al mi, ne al ŝi... Tie, antaŭ la statuo de Astarte mi estis la unua... Kaj ĉi tie?... La soldatoj tamburas kaj ludas flutojn, la oficistoj krucas la manojn sur la brusto kaj klinas la kapojn antaŭ la domo de la Hebreino...

— Antaŭ mia unuenaskita filo — interrompis malpacience la princo — kaj li ne estas Hebreo...

— Li estas Hebreo!... — kriegis Kama. Ramzes salte leviĝis.

— Ĉu vi estas freneza?... — diris li, subite trankviliĝinte. — Ĉu vi ne scias, ke mia filo ne povas esti Hebreo?...

— Kaj mi diras al vi, ke li estas!... — kriis ŝi, batante la tablon per la pugno. — Li estas Hebreo, kiel lia avo, kiel liaj onkloj, kaj lia nomo estas Izaako...

— Kion vi diris, Fenicianino?... Ĉu vi volas,

ke mi forpelu vin?...

— Bone, forpelu min, se mensogo eliris el mia buŝo... Sed se veraj estas miaj vortoj, forpelu tiun... la Hebreinon, kun ŝia bastardo, kaj la palacon donu al mi... Mi volas esti la unua en via domo, mi tion meritas... Tiu trompas vin, mokas vin... Kaj mi por vi forlasis mian diinon... min minacas ŝia venĝo...

— Donu al mi pruvon, kaj la palaco estos via... Ne, tio estas malvera!... — diris la princo. — Sara ne farus tian krimon... Mia unuenaskita filo!...

— Izaako!... Izaako!... — kriis Kama. — Iru al ŝi kaj konvinku vin...

Ramzes, duone senkonscia, elkuris de Kama kaj direktis sin al la palaco, kie loĝis Sara. Malgraŭ la stela nokto, li perdis la vojon kaj iom da tempo vagis en la ĝardeno. La freŝa aero rekonsciigis lin, li retrovis la vojon kaj eniris en la domon de Sara preskaŭ trankvila.

Malgraŭ la malfrua vespero oni ne dormis tie. Sara per propraj manoj lavis la vindaĵojn de la filo, kaj la servistoj, por pasigi la tempon, manĝis, trinkis kaj muzikis.

Kiam Ramzes, pala de ekscito, haltis sur la sojlo, Sara ekkriis, sed tuj trankviliĝis.

— Saluton al vi, sinjoro — diris ŝi, viŝante la malsekajn manojn kaj klinante sin al liaj piedoj.

— Sara, kia estas la nomo de via filo?... — demandis li.

Terurita ŝi kaptis sin je la kapo.

— Vi ja scias, sinjoro, ke Seti... — respondis ŝi per apenaŭ aŭdebla voĉo.

— Rigardu miajn okulojn...

— Ho Jehovo!... — murmuretis Sara.

— Vi vidas, ke vi mensogas. Kaj nun mi diros al vi: mia filo, la filo de la egipta kronprinco, estas nomata Izaako... kaj li estas Hebreo, malnobla Hebreo...

— Ho Dio!... Dio!... — ekkriis ŝi, falante al la piedoj de la princo

Ramzes eĉ por unu momento ne levis la kapon, lia vizaĝo fariĝis griza.

— Oni avertis min — diris li — ke mi ne prenu Hebreinon en mian domon... Miaj internaĵoj tordiĝis, kiam mi vidis mian bienon, plenan de Hebreoj... Sed mi kaŝis la abomenon, ĉar mi konfidis al vi. Kaj vi, kun viaj Hebreoj, ŝtelis mian filon, ŝtelistino de infanoj!...

— La pastroj ordonis, ke li estu Hebreo... — murmuretis Sara, ploregante ĉe la piedoj de la princo.

— La pastroj?... Kiuj?...

— La plej nobla Herhor... la plej nobla Mefres... Ili diris, ke tio estas necesa, ĉar via filo devas fariĝi la unua reĝo de Hebreoj...

— La pastroj?... Mefres?... — ripetis la princo. — Reĝo de Hebreoj?... Mi ja diris al vi, ke via filo povos esti ĉefo de miaj arkistoj, mia skribisto... Mi tion diris al vi, kaj vi mizera pensis, ke la titolo de hebrea reĝo egalas la titolon de mia arkisto aŭ skribisto?... Mefres... Herhor!... Dankon al la dioj, ke mi fine komprenis ĉi tiujn altrangulojn kaj ke mi scias, kian sorton ili destinas al miaj posteuloj...

Momenton li konsideris, mordis la lipojn. Subite li ekkriis per potenca voĉo:

— Ĉi tien!... servistoj... soldatoj!...

Tuj komenciĝis pleniĝi la ĉambro. Eniris plorante la servistinoj de Sara, oficisto

kaj intendanto de la domo, poste sklavo, fine kelke da soldatoj kun oficiro.

— La morto!... — ekkriis Sara per disŝiranta voĉo.

Ŝi ĵetis sin al la lulilo, kaptis la infanon kaj stariĝinte en la angulo de la ĉambro ŝi ekkriis:

— Min mortigu... sed lin mi ne donos... Ramzes ekridetis.

— Centestro — diris li al la oficiro — prenu ĉi tiun virinon kun la infano kaj konduku en la konstruaĵon, kie loĝas la sklavo de mia domo. Ĉi tiu Hebreino ne estos plu sinjorino, sed servistino de tiu, kiu ŝin anstataŭos.

— Kaj vi, intendanto — aldonis li, sin turnante al la oficisto — memoru, ke la Hebreino ne forgesu morgaŭ matene lavi la piedojn al ŝia sinjorino, kiu tuj venos ĉi tien. Kaj se ĉi tiu servistino montriĝus malobeema, laŭ la ordono de sia sinjorino ŝi devas ricevi vergojn. Forkonduku ĉi tiun virinon en la ĉambron de la servistoj!...

La oficiro kaj intendanto proksimiĝis al Sara, sed haltis, ne kuraĝante ŝin tuŝi. Cetere, tio ne estis necesa. Sara envolvis en tukon la plorantan infanon kaj forlasis la ĉambron, murmuretante:

— Ho Dio de Abrahamo, Izaako kaj Jakobo, ekkompatu min...

Ŝi profunde kliniĝis antaŭ la princo, el ŝiaj okuloj fluis silentaj larmoj. Ramzes aŭdis ŝian dolĉan voĉon ankoraŭ en la vestiblo:

— Dio de Abrahamo, Iza...

Kiam ĉio trankviliĝis, la vic-reĝo diris al la oficiro kaj intendanto:

— Iru kun torĉoj en la domon inter la figarboj...

— Mi komprenas — respondis la intendanto.

— Kaj tuj transkonduku ĉi tien la virinon, kiu loĝas tie...

— Tio estos farita.

— Tiu virino estos de nun via sinjorino kaj la sinjorino de Sara, de la Hebreino, kiu ĉiumatene devas al sia sinjorino lavi la piedojn, verŝi sur ŝin akvon kaj teni antaŭ ŝi la spegulon. Tia estas mia volo kaj ordono.

— Tiel estos farita ĉio — respondis la intendanto.

— Morgaŭ matene vi diros al mi, ĉu la nova servistino ne estas malobeema...

Doninte la ordonojn, la vic-reĝo revenis en sian domon, sed la tutan nokton li ne povis dormi. En lia profunda animo flamiĝis la fajro de la venĝo.

Li sentis, ke eĉ por unu momento ne levinte la voĉon, li frakasis Saran, la mizeran Hebreinon, kiu kuraĝis trompi lin. Li punis ŝin, kiel reĝo, kiu per unu ekstremo de la palpebro deĵetas la homojn de la supro de l' honoroj en la senfundaĵon de la sklaveco. Sed Sara estis nur ilo de la pastroj, kaj la kronprinco havis tro grandan senton de la justeco por, rompinte la ilon, pardoni al la veraj kulpuloj.

Lia furiozo tiom pli grandiĝis, ke la pastroj estis netuŝeblaj. La princo povis forpeli nokte Saran en la ĉambron de la servistoj, sed ne povis senigi Herhoron je lia povo, nek Mefreson je lia ĉefpastreco. Sara falis ĉe liaj piedoj, kiel piedpremita vermo; sed Herhor kaj Mefres, kiuj rabis al li lian

unuenaskitan filon, leviĝis super Egipto kaj (kia honto!) super la estonta faraono, kvazaŭ piramidoj...

Kaj li rememoris (kioman fojon en ĉi tiu jaro!) la maljustaĵojn, kiujn kaŭzis al li la pastroj. En la lernejo ili tiel batis lin per bastonoj, ke krakis lia spino, aŭ igis lin malsati tiel, ke lia ventro enfalis ĝis la dorso.

Dum la lastaj manovroj Herhor malbonigis al li la tutan planon, poste deĵetis la tutan kulpon sur lin kaj senigis lin je la komando de korpuso. La sama Herhor altiris sur lin la malfavoron de lia sankteco pro tio, ke li prenis en sian domon Saran, kaj nur tiam revokis lin al la honoroj, kiam la humiligita princo pasigis kelke da monatoj en memvola ekzilo.

Ŝajnis, ke kiam li estos nomita ĉefo de korpuso kaj vic-reĝo, la pastroj ĉesos premegi lin per sia protekto. Sed ĝuste nun ili kontraŭmetas al li duoblajn fortojn. Ili faris lin vic-reĝo, por kio?... Por malproksimigi lin de la faraono kaj fari malhonoran traktaton kun Asirio. Kiam li volis informiĝi pri la stato de l' regno, ili devigis lin pentofari en la templo; tie ili trompis lin per mirakloj kaj teruroj kaj donis al li tute malverajn klarigojn.

Poste ili miksis sin je liaj plezuroj, amatinoj, rilatoj kun Fenicianoj, ŝuldoj; fine por humiligi lin, ridindigi en la okuloj de Egiptanoj, ili faris lian unuenaskitan filon Hebreo!...

Kiu kamparano, kiu sklavo, kiu kondamnito en la minejoj, kiu Egiptano ne havus la rajton diri al li:

— Mi estas pli bona ol vi, vic-reĝo, ĉar neniu mia filo estis Hebreo...

Sentante la pezon de la ofendo, Ramzes

komprenis ankaŭ, ke li ne povas tuj ĝin venĝi. Li decidis prokrasti la aferon. En la pastra lernejo li kutimis regi sin mem, en la kortego li ellernis paciencon kaj malsincerecon; ĉi tiuj ecoj estos lia ŝildo kaj armilo en la batalo kontraŭ la pastroj... Dume li erarigos ilin, kaj kiam venos ĝusta momento, li ekbatos tiel, ke ili ne leviĝos plu.

Komencis tagiĝi. La kronprinco profunde ekdormis, kaj kiam li vekiĝis, la unua persono, kiun li rimarkis, estis la intendanto de la palaco de Sara.



— Kion faras la Hebreino? — demandis la princo.

— Konforme al la ordono de via ekscelenco, ŝi lavis la piedojn al sia nova

sinjorino — respondis la oficisto.

— Ĉu ŝi estis malobea?

— Ŝi estis plena de humileco, sed ne sufiĉe lerta, kaj la sinjorino ekkolerinte piedbatis ŝin inter la okulojn.

La princo eksaltis.

— Kaj Sara?... — demandis li rapide.

— Ŝi falis teren. Kaj kiam la nova sinjorino ordonis al ŝi iri for, ŝi eliris, mallaŭte plorante.

La princo komencis paŝi en la ĉambro.

— Kiel ŝi pasigis la nokton?...

— La nova sinjorino?...

— Ne!... — interrompis la kronprinco. — Mi demandas pri Sara.

— Konforme al la ordono, Sara iris kun la infano en la ĉambron de la servistoj. Tie iu virino, de kompato, cedis al ŝi freŝan maton, sed Sara ne kuŝiĝis kaj sidis la tutan nokton kun la infano sur la genuoj.

— Kaj la infano ?... — demandis la princo.

— La infano fartas bone. Hodiaŭ matene, kiam la Hebreino iris servi la novan sinjorinon, aliaj virinoj banis la etulon, kaj la edzino de l' paŝtisto, kiu ankaŭ havas suĉinfanon, nutris ĝin.

La princo haltis antaŭ la intendanto.

— Malbone estas — diris li — se bovino, anstataŭ nutri sian idon, iras plugi kaj estas batata per bastono. Do, kvankam la Hebreino estas tre kulpa, mi ne volas,

ke suferu ŝia senpeka ido... Sara ne lavos plu la piedojn de la nova sinjorino kaj ne estos piedbatata de ŝi. En la domo de la servistoj vi donos al ŝi apartan ĉambron, kelke da mebloj kaj nutraĵon, kian bezonas virino, antaŭ ne longe akuŝinta. Ŝi nutru en trankvilo sian



infanon.

— Vivu eterne nia estro! — respondis la intendanto kaj ekkuris plenumi la ordonojn de l' vic-reĝo, ĉar la tuta servistaro amis Saran, kaj en la daŭro de kelke da horoj jam ekmalamis la kolereman kaj krieman Kaman.



Kajeroj el la Suda

Bulteno de Hispana Asocio de
Laboristoj Esperantistaj



<http://www.gazetoteko.com/hale/kels91.pdf>

<http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k91.html>

Enhavo

Redaktore.....	2
La fraŭdo pri pensiplanoj.....	3
Inŝ' Ala'!.....	5
Vivu la Respubliko!.....	6
Fransisko! Kial vi ne silentas?7	
Pri la flago de la respubliko....	9
La Faraono: ĉapitro 40.....	12
Ĉu la fino de la krizo?.....	18

Kovrilo: Fiaj stultuloj murdas en
Parizo ĵurnalistojn, kaj ili konkludas,
ke ili venĝis Muhamadon.

Pagmaniero:

Konto ES30 2100 4617 4122 0011 5275.

Notu vian nomon kaj la jaron, kiun vi pagas.

Tute verkita kaj kompilita per senpagaj
linuksaj rimedoj: MacOS, OpenOffice
Writer, Gimp kaj Scribus.

Prezidas: **Johano A. Cabezos.**
Redaktas: **Jesuo de las Heras.**
Korektas: **Jozefo Pina.**
Retskribu al: **kajeroj@gmail.com**

Oni povas reprodukti la enhavon, kondiĉe,
ke oni citu la originon.

Pri la enhavo de la artikoloj respon-decas la
aŭtoro, ne la redakcio.

Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj,
kvankam ni klopodos publikigi ĉiun artikolon
kies enhavo ne mistraktu personon.

ISSN 1886-1938 (printita)
ISSN 1886-1997
Depósito legal: Z-2398-88